

"Perspektivoj de lingva komunikado en EU" Nitra, Slovakio, 28 - 29 julio 2016

„Nitra Deklaro“

L'Italia è Fatta. Restano da fari gli italiani.

(Ni faris Italion. Nun ni devas fari italojn), Massimo d'Azeglio, 1866.

Ni faris Eŭropon, nun ni devas fari eŭropanojn. Nur eŭropanoj povas havigi la necesan afekcian kaj demokratitan legitimecon al EU. Briteliro evidentigis ke la nuna krizo en la eŭropa integriĝo estas identeca. Regi diversecon estas la ŝlosila afero. Bezonatas plibonigi tiun regadon per akordigo de registaraj instancoj kun komunikaj komunumoj. La manko de tia akordigo estas ekzisteca problemoj por EU.

Multaj civitanoj prave timas ke, por sukcesigi Eŭropon, ilia nacia identeco detruendas. Necesas okupiĝi pri tiu timo. La civitana engaĝiĝo en Eŭropo restos malforta ĝis la civitanoj eksentos eŭropan identecon, en harmonio kun siaj identecoj nacia kaj regiona. Tiel estas ĉar, malgraŭ la grandaj paŝoj antaŭen de la eŭropa integriĝo en la ekonomia kaj komerca kampoj, ties kulturaj, edukaj kaj lingvaj aspektoj restis ĉe la nacia nivelo. Ĝis nun ne okazis provo evoluigi komunan edukadon por eŭropaj civitanoj. Lingvoj ebligas komunikadon sed, egale grave, ili esprimas identecon. Ekzistas nuntempe neniu lingvo kiu esprimus tuteŭropan identecon. La devizo de EU „unuiĝintaj en diverseco“ ŝajnas favori diversecon je la kosto de unueco. Necesas tamen celi ekvilibron inter ili.

La kreskanta tutmondiĝo kondukis al superregado de la angla. Kiel tutmonda lingvo, la angla tamen malbone povas esprimi eŭropan identecon. Se Britio forlasos la Eŭropan Union, nur 10 % de EU-civitanoj parolos la anglan kiel gepatran lingvon aŭ tre bone kiel fremdan lingvon. Ekskluziva uzo de la angla en EU pliprofundigus socian malegalecon kaj la angla estus perceptata kiel elitisma lingvo. Troa koncentriĝo je la angla estas la ĉefa faktoro kiu malfortigas la deziron studi aliajn lingvojn. Lingva malegaleco estas ofte rezulto de malprudentaj lingvaj politikoj kaj ne produkto de spontaneaj sociekonomiaj fenomenoj. Lingva maljusteco generas diversajn formojn de ekonomia kaj socia diskriminacio. Helpe de taŭgaj lingvaj politikoj ni devus okupiĝi pri tiuj ĉi fenomenoj ĉe la EU-nivelo.

Ekzistas ĝeneraliĝinta tendenco subtaksi la gravecon de lingvopolitiko kiel integranda faktoro. Tio fortikigas la nunan situacion, kiu estas neakceptebla eĉ por britaj civitanoj, kiel montris Briteliro kaj aliaj referendumoj. Multlingveco estas kerna EU-valoro kaj samtempe kerna valoro por certigi egalecon de EU-civitanoj kaj ankaŭ parolantoj de regionaj kaj minoritataj lingvoj. Necesas esplori tiujn ĉi gravajn kampojn.

Instruado de fremdlingvoj ne donas la atendatajn rezultojn. Ambaŭ Eurobarometer kaj SurveyLang montris malkreskon de scipovo de la unua kaj de la dua fremdlingvoj. Ni vidas klaran neceson de nova strategio por plibonigi lingvolernadon kaj plialtigi lingvokonscion kaj interkulturajn kapablojn, nome per empirie esplori kiu fremdlingvo plej verŝajne kuraĝigos postan lernadon de pliaj lingvoj. La landoj de Visegrad 4+ estas ideala kadro por enkonduki tiun ĉi novigan aliron kaj por realigi praktikajn paŝojn, tiel kontribuante kaj al lingva diverseco kaj al komuna eŭropa identeco.